LA PACDEFENDANTO

N-ro. 18. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO JUNIO 1953.

# ĈU NI UZU ESPERANTON?

Tro humuliga demando, kiel ĝin starigis k-do Martón Lajos, ĝen. sekretario de SEAT el Budapest, en sia letero de 2,sept. 1952 adresitan al la Centra komitato de la Ĉeĥoslov. komunista partio, kies kopion li al ni sendis en majo 1953. K-do Lajos argumentas, ke en alvoko de la Viena packongreso oni diras,"necesas uzi ciujn rimedojn de la skriba k. parola agitado por la paco".......

Nia modesta demando estas, ĉu al tiuj uzeblaj rimedoj apartenas ankaŭ la helpa lingvo Esperanto,kiun ni kun multaj komunistoj,socialistoj kaj pacbatalantoj uzas depost jardekoj kaj opinias ĝin taŭga por krei"amikajn interrilatojn" inter la diverslanda laboristaro, al kio instigas la 1.punkto el la statutoj de la Sovjetunia Komunista Partio .......La Finnoj, Islandanoj, Japanoj,Ĉinoj,Nederlandanoj,Svedoj ktp. ne scias la rusan lingvon k. ne volas uzi la anglan,francan aŭ germanan. Ĉu do ni rajtas interrilati kun ili pere de Esperanto? Precipe por niaj asiaj gek-doj tio signifas facilan solvon al interpopola kontakto sen ofendo de ilia nacia,fiereco kaj rajto,egale ebligante solidaran kunlaboron,diskonigon de siaj luktoj,packlopodoj, konstrulaboroj. Ĉu do apartenas E. al la uzendaj rimedoj kaj ĉu ni uzu ĝin? Kion ni respondu al niaj nordaj, okcidentaj kaj ekstremorientaj amikoj?

K-do Stalin foje diris"ni fortigu la internaciajn amikajn rilatojn kun la laboruloj de ĉiuj landoj,kies intereso estas la interpopola paco kaj amikeco".

Jen ekstraktoj el unupaĝa letero enhavinta ankoraŭ aliajn gravajn citaĵojn el kiuj videbliĝas,ke al la skribinto la starigitaj demandoj estas tute klaraj.

Sed, kial do humilige demandi ĉe niaj gvidantoj, ĉu ili permesas al ni uzi la lingvon en tiu senco? Ĉu sole ili havas kapon prudentan por decidi, ĉu ni uzu aŭ ne uzu? Ĉu estas inda al komunisto, estante konvinkita pri la ĝusteco kaj uzebleco de iu ajn rimedo/en tiu kazo Esperanto/ demandi antaŭe permeson ĉe niaj gvidantoj? Ĉu ne sufiĉas por ni la klaraj decidoj de la Tutmonda packonsilantaro kaj de Stalin mem kaj la losungo de Karl Marx: Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu!" por klare kompreni, ke estas nepra devo de ĉiu matura partiano eluzi ĉiujn rimedojn por atingi la efektivigon de la genialaj ideoj de Marx kaj Lenin?

Ĉu ni mem ne montras ne sufiĉan instruitecon kaj maturecon devante pri tiaj tute primitivaj kaj al komunisto memkompreneblaj demandoj antaue interkonsiliĝi kun niaj estroj? Aŭ ĉu ni estas tiom limigitaj koncerne niaj membrorajtoj, ke sen antaua konsento de la estraro, ni eĉ la partian programon ne rajtas plenumi? Fakto estas, ke kelkaj pli altaj partifunkciuloj ne aprobas Esperanton kiel ilon taŭgan por kontribui al la plenumo de la partia programo. Sed, ĉu ne Lenin mem diris, ke en okazo de oportunismo necesas batali eĉ kontraŭ propraj partianoj? Al ĉiu celkonscia komunisto estas klara, ke necesas eluzi ĉiujn rimedojn por garantii al la popoloj la mondpacon kaj prepari ilin por la fina akcepto de la marks-leninisma programo......

Kial do ni ankoraŭ humilige demandu, ĉu Esperanto estas por tiu celo taŭga, se ni estas pri tio jam firme konvinkitaj? R.Burda

# ĜOJIGA FESTO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ

Ne forgeseblaj restas la tagoj de 23-24 majo, kiujn travivis niaj gekamaradoj dum la regiona konferenco en Přerov /Moravio/. Spite de diversaj malhelpoj kaj baroj, malgrau la kalumnioj,disvastigitaj de niaj malamikoj ĉirkau Esperanto,en Přerov kunvenis en harmonia gefrata rondo ĉirkaŭ 200 gekamaradoj, delegitoj de Esperanto rondetoj el uzinaj kaj urbaj kulturaj kluboj, el vico da urboj de la moravia provinco, por diri al si reciproke siajn spertojn pri sukcesoj kaj malsukcesoj, por instruiĝi kaj firmiĝi sin reciproke en la batale por la tutmonda paco kaj disvastigo de ĝia p ejefika kaj jam multe uzata ilo, Esperanto.

Partoprenis gastoj el malproksimmaj lokoj de nia lando,k-doj,el Bohemio,Silezio ecSlovakio.Ĉeestis ankau k-do Burda,la redaktante de nia cirkulero LA PACDEFENDANTO, kiu esprimis sian grandan ĝojon prâ la amasa ĉeesto de esperantista junulara ecinfanoj. Precipe impresa estis Esp-lingva salutparolado de 5jara knabineto al la ĉeestintoj. Ĉirkau 10jara knabeto prisorĉis la partoprenintojn per vere arta kanto de arioj el opero en internacia lingvo. Operkantistino V Borská el Brno,kantista kolektivo el Ostrava kaj ĉiuj aliaj sukcesplene abundiĝis la programon. La interkonatiĝa vespero procedis unusole en la internacia lingvo kaj same estis dimanĉe dum la laborkonferenco.K-do Burda en sia parolado substrekis la ĝojigan fakton, ke nia estonto estas garantiata en nia junularo,kiu tiom multnombre ĉeestas la konferencon. La movado kreskas malgraŭ la baroj kaj precipe ĝojiga estas la intereso inter la junularo- Li esprimis la deziron,ke ankaŭ foje niaj gejunuloj havu la okazon partopreni internacian kongreson por persone ĝui la harmonion inter la gek-doj de plejdiversaj nacioj, kiun kapablas produkti nia mirinda internacia lingvo. En tia okazo la memkonfido kaj firmeco ekvekiĝus ankorau pli fortan persistecon sur nia vojo al tutmonda interkomprenigo kaj proleta internaciismo.

K-do Burda konstatis, ke la intenco likvidi la tutlandan Esperanto movadon pere de la likvido de ĝia Centro,rikoltis totalan fiaskon. Montriĝis la malĝusteco de falsa iluzio flanke de kelkaj oficialaj organoj. Montriĝis klare, ke la progresemaj esperantistoj ne estas fabrikitaj el margarino. Pasis unu kaj duon jaro de post la likvidiĝo de la Esp-centro en ĈSR.Oni firme supozis, ke iom post iom likvidiĝos mem nia tuta movado. Hodiaŭ ni povas konstati la malon. Krom kelkaj individuloj, kiuj ektimiĝite forlasis niajn vicojn,naskiĝis nombro da tute novaj homoj,ni povas diri; homoj, teksitaj el speciala ŝtofo, kiuj,estante firme konvinkitaj pri sia ĝusta vojo kaj praveco de sia batalo,ne lasas sin de iu ajn fortimigi de sia afero.Ja inter ni troviĝas ec homoj, kiujn nek Hitler sukcesis rompi per siaj kruelaj koncentrejoj kaj mortigaj gasejoj, kiuj spite de ĉio restis fidelaj al sia ideo - al la kredo je la venko de la tutmonda paco kaj plifeliĉa estonto de la homaro. Naskiĝis novaj kunlaborantoj,kiuj ne nur estas esperantistoj,sed veraj kaj entusiasmaj batalantoj por la geniala ideo de nia kara majstro Zamenhof.

Tamen necesas diri, kaj memkritike konfesi,ke ni ne plene ankorau sukcesas eluzi ĉiujn eblecojn por venke gajni nian batalon. Ne ĉie ni ankorau sukcesis enpenetri la grandajn amasorganizojn,grupojn,klubojn ktp. por pere de niaj servoj akiri ilian simpation,trovi kunlaborantojn kaj novajn adeptojn per nia afero. Necesas nun, ke ni tien ankorau aranĝu! Ni partoprenu la kunvenojn de la partio, de sindikato,de junularo,pioniroj. Ni eniru la lokajn packomitatojn,gimnastikajn,religiajn kaj aliajn organizojn. En ili ni aranĝu prelegojn, paroladojn per lumbildoj,ekspozicioj ktp. Ni disponigu al ili niajn esp.kantistajn horojn,ni proponu al ili nian abundan materialon por iliaj propagandaj ekspoziciaj kostoj kaj murgazetoj,ni aranĝu al ili kontakton per reciproka korespondado kun samtendencaj eksterlandaj organizoj kaj grupoj kiel ni jam multloke praktikas inter niaj infanoj. Ni ĉesu la propagandon rektan por

Esperanto kaj laborante pere de Esperanto,ni pli efike sukcesos akiri nian celon! Tielmaniere ni ankaŭ plej efike respondas al la artikoloj kontraŭesperantaj de profesoro Trávníček. Ni estu persistaj,fidele ni helpu unu al la alia,tenante daŭran kontakton de urbo al urbo kaj loko al loko. Ni intensivigu nian en-kaj eksterlandan korespondadon,ĉar ne havante eblecon partopreni internaciajn kongresojn, ni almenaŭ plene eluzu la eblecon de reciproka korespondado kaj firme tenu la internacian kontakton!

K-do Burda ankaŭ menciis la renkontiĝon de esp. pacdefendantoj,okazantan en semptembro 1953 en St.Pölten/ Aŭstrio/kaj varme rekomendis al la ĉeestintoj peti jam nun ĉe la kompetentaj organoj eldonon de pasporto al diversurbaj delegitoj de nia lando. Plue li proponis, ke iu el la proksimaj reg.konferencoj okaziĝu en iu urbo de la centro de nia lando por ebligi tutlandan renkontiĝon al niaj progresemaj esperantistoj. Tielmaniere ĉiu individulo eĉ izolulo havu la okazon konvinkiĝi pri la kresko de nia movado kaj sekve de tio reentusiasmiĝi kaj ĉerpi novan forton kaj esperon al ankoraŭ pli energia laboro kaj agado por nia eminenta afero. Post la parolado de k-do Burda raportas la delegitoj el la urbaj kaj uzinaj kluboj.

Del. el Gottwaldov-Otrokovice raportas,ke la rondeto kunvenadas regule ĉiu lunde kaj samtempe okazas kurso por progresintoj. K-Kohutek el la feruzinoj en Třinec raportas pri laborkonferenco,okazonta la 20-21. de junio en Třinec /monto Čantorio/ kaj invitas al multnombra partopreno. Ankaŭ en Třinec oni komencas nun propagandi pere de Esperanto. Koncerne la atakoj de prof. Trávníček reagas nur kelkaj funkciuloj dume la simplaj partianoj estas je nia flanko. K-do Kočvara,deleg. de la urba klubo en Opava informas pri ĝia sukcesplena agado kaj plendas,ke la bulteno per nia tutlanda junularo "LA TAGIĜO" ne estas sufiĉe prizorgata per raportoj de diverslokaj delegitoj kaj alvokas por pli aktiva kunlaboro. Okaziĝos 14 taga somera kurso sub tendaro komence de 20. junio en Hradec u Opavy kiu kostas inkluzive loĝado kaj manĝado 900 Kčs. Ĉiu partoprenanto ricevos 50 % fervojrabaton.

Parolis del-o el Ostrava-junulro,k-do R.Mychna el Lichnov,k-do el uzina klubo en Kroměříž kie ili kunvenadas ĉiu lunde kaj funkcias kurso kun 10 gelernantoj. Del. de Junularo-Praha raportas pri regulaj prelegoj kiujn aranĝadas k-do Šustr,Hromada kaj kamaradino Šupichová. Oni kursas en grupetoj po 3-4 lernantoj. K-do Kořínek el kultura klubo de J.A. Komenský en Brno konstatas malkreskon de la membraro ĝis 50 % kaj reduktas tion el la kontraŭ-esperanta agado de prof. Trávníček kies logloko estas ĵus la urbo Brno. Dume la junularo viglas. Kvankam ne eblas publike labori,oni tamen regule kunvenadas perfektiĝas kaj amuzas. K-do Figár el Kopřivnice raportas, ke ilia movado ne dormas. Okaziĝis impresa ekspozicio kaj la 25. de junio estos prelego de k-do Rud. Hromada en uzina klubo. K-do A. Klimsza el Dolní Suchá /karbminejo/ raportas pri la bona funkciado de la lokaj organizoj kaj notas koncerne prof. Trávníček,ke tiu ambicias unusole,per kalumniado de Esperanto populariĝi sian nomon en la tuta lando,ĉar li ne havas alian okazon. K-do Tichoň el Vojkovice raportas pri komenco de nova kurso en proksima tempo. K-do Slaný, del. el la klubo en ferfandejoj de Vítkovice raportas,ke inter la abundaj rondetoj de tiu klubo,sole la esperantista estis premiita per donaco de du valoraj libroj pro sia modela agado. K-do Slaný menciis okazintaĵon el kiu rezultas, ke ne ĉiuj profesoroj estas samopiniaj kun prof. Trávníček. Ekzemple fama prof. Pallat dum prelego pri Ĉinio,estinte demandita; kiu lingvo ebligus plej facila interkompreniĝo inter la popoloj,respondis: Plej bone oni interkompreniĝus pere de Esperanto,poste eble pere de la angla.,franca ktp. lingvoj. Rimarkinda estas,ke profesoro Pallat ne estas esperantisto.

K-dino Jirečková salutis la konferencon en la nomo de la rondeto en Lanškroun. La rondeto konsistas

el 60 anoj. Funkcias kurso kun 15 komencantoj kaj 16 progresintoj. Nova kurso kun 20 lernantoj komencis en aprilo. Ankoŭau parolis k-do Kremer el Košice, el Svit k-dino Vaňková, el Duchcov juna ministo, el Vrutky, el Budějovice k-do Vlk gvid. de la junularo, k-do Werner el Trutnov anoncas komencon de nova kurso, k-do el Pardubice, k - do Dušan el Chrudim, k-dino Reinhartová el Hradec. Kamarado Werner anoncas okaziĝon de tutlanda konferenco de junularo la 1-2. de aŭgusto en Hradec u Opavy kaj invitas al multnombra partopreno. Fine prelegis k-do Kubala el Ostrava pri la vivo de Marks kaj Lenin.

La konferencanoj emociiĝitaj de la dutaga harmonia kunvivo disiris altgrade entusiasmiĝitaj, kun nova forto kaj refreŝiĝita energio por raporti en siaj lokaj rondetoj pri la firma entusiasmo kaj persista unueco, spertita dum tiu ĉi belega konferenco, okazinta dank al la senlaca oferemo de niaj junaj kaj maljunaj gekamaradoj en Přerov sub la ekzemplodona organizo de k-do Rich. Júrka, Kočvara kaj aliaj.

## MIGRANTA EKSPOZICIO.

pri tutmonda klasbatalo kaj pacmovado troviĝas nun en Nový Jičín /Moravio/ La ekspozicio konsistas el grandaj tabuloj kun surgluitaj ĉiulandaj afiŝoj, fotoj kaj bildoj, akompanataj de ĉeĥa teksto kaj klarigoj. La tabuloj estas stariĝeblaj sur tabloj en longeco de 40 metroj. La tuta ekspozicio troviĝas en 4 grandaj lignokestoj kaj estas transportebla per fervojo al ĉiu enlanda loko. Vi povas ĝin ricevi prunte por 2-3 semajnoj kontrau pago de 60 novaj Kčs kaj pago de transportkostoj al la postsekvanta loko. La ekspozicio estas trafa propagandilo por Esperanto kaj kontrau kosmopolitismo. Por ŝpari altan transportkoston ni rekomendas la mendon al rondetoj en proksimeco de urbo Nový Jičín. Car jam anoncis sian intereson ankaŭ rondetoj el Slovakio, ni petas nian slov. gek-dojn, kiuj kiuj havas intereson kaj okazon instali ĉi ekspozicion, ke ili jam nun ekkontaktu kun k-do Rud. Burda, Palackého nám. č. 6, Plzeň.

## JOLIOT CURIE AL ST PÖLTEN

Jes, tio estus granda sukceso. Ja eĉ Eugene Cotton povus partopreni. Temas ja pri kongreso de pacdefendantoj, kvankam esperantistaj, sed tamen tutmondaj kiuj jam longe antaŭ la decido de la packongreso en Wieno praktikas la interrilatojn de popolo al popolo pri kulturaj, progresemaj kaj porpacaj aferoj, senpere, rekte, pere de lingvo internacia. Esperanto.

Ambaŭ gravaj reprezentantoj de la monda pacmovado havus la plej bonan okazon persone konvinkiĝi pri la uzebleco kaj praktikado de jam ekzistanta internacia lingvo. La partopreno de tiuj eminentuloj samtempe donus al nia renkontiĝo iagradan oficialecon, kiu obligus al esp-istoj pacbatalantoj multnombran partoprenon el popoldem. landoj, kies registaroj ĝis nun severe konsideris pri eldono de pasporto kaj de post la 1945 jaro ankorau ne permesis nek al unu esperantisto partopreni internacian kongreson. Ili estus devigitaj ne rifuzi eldonon de pasporto al St. Pölten, se la renkontiĝo okazus sub la protekto de la gvidantaj pacmovadaj personoj.

Ni esperu, ke niaj k-doj en St. Pölten sukcesos tion aranĝi. Intertempe jam nun estas necesa, ke niaj čsl. gek-doj petu eldonon de pasporto, bazante sian peton, ke temas pri unua grava renkontiĝo de esp. pacdefendantoj el ĉiuj landoj, ce kiu nepre necesas la partopreno de popoldemokrataj delegitoj. La kongreso okazos fine de augusto aŭ komence de septembro en St. Pölten/Austrio/. Detalajn informoj kaj aliĝilojn petu ĉe k-do Anton Balague, Kirchenweg n-o 12. St. Pölten, Aŭstrio.

## DU ESPERANTO-BROŜUROJ EL ĈINIO

"La plejforta voĉo de la paco" kaj "Per nova maniero por nova afero" estas ankoraŭ aĉeteblaj per 6.40 Kčs /novaj/ ĉe nia redaktejo. Gek-doj mendu tuj! Ni urĝe bezonas monon.

## HELPON AL GREKAJ MALLIBERULOJ!

La LIGO POR DEMOKRACIO EN GREKIO

/fondita en 1945/ eldonis averton adresitan al la tutmondaj demokratoj pri la intencoj de la greka registaro de Papagos kontraŭ miloj da grekoj malliberuloj, kiuj jam trovigas 5,6 kaj 7 jarojn en grekaj karceroj.

La registaro proponas apartigi la politikajn malliberulojn en kelkajn kategoriojn kaj disigi ĉi ujn kategoriojn en apartajn karcerojn. La kategorioj estas: "Dangeraj komunistoj", malpli dangeraj", "Nepentuloj", tiuj, kiuj pentis, sed poste ne observis la malkonfeson, ktp.

Ĵus oni apartigis la "dangerajn" kaj estis anoncita ilia deporto al malliberejo sur insulo Cefalonio. La gemalliberulojn de la dua kategorio oni sendos al Kalami-malliberejo sur insulo Gretio. Komitato, kiu esploras la malliberulojn, decidante ilian sorton ekfunkciis rekte en la karceraj.

La LIGO speciale avertas, ke tiu ĉi-apartigo celas starigi novajn kategoriojn por forigi ankoraŭ la jam sufiĉe mizeran vivnivelon de la nunaj politikaj malliberuloj.

La registaro celas tion, ĉar la leĝoj de Grekio /kvankam tio ne estas ĉiam observata/ donas al la malliberuloj iaspecan protekton kaj certecon. Post transigo al la novaj malliberejoj eĉ tiuj primitivaj protektoj malaperos. Necesas ankaŭ atentigi, ke la decido, starigi esplorejn komitatojn, estas kontraŭleĝaj kaj rajtigas nin plene, suspekti tiun ĉi novan manovron.

Efektive tiuj novaj paŝoj signifas forpreni la malliberulojn el la manoj de la ministerio, kiu ĝis nun respondecis pri ili, kaj transdoni ilin en la manojn de la Sekur-Policio. La agado de la S.P. la torturado kaj senhoma traktado rilate la arestitoj estas jam bone konataj. Ekzistas serioza kauzo por kredi, ke la metodoj uzotaj estos la same timigaj, torturaj kiel antaŭe.

Ni plue alarmigas pro la oficiala anonco, ke la novaj paŝoj espereble plifacilligos la "reedukadon" de la politikaj malliberuloj. La LIGO revokas al cies memoro la fian reedukadon de politikaj malliberuloj okazintan ĝis fino de 1950. Miloj torturiĝis ĝis frenezigo, la traktado mortigis multajn aliajn. La "reedukado" estis simpla perforto por devigi la arestitojn malkonfesi siajn kredojn. La perfortaj krualaĵoj, tiam faritaj, tiel ekmovis la publikan opinion tra la mondo, ke la registaro de generalo Plastiras estis devigita forpreni la politikajn malliberulojn el la torturejoj de Markronisos.

Ĉi novan atakon kontrau la malliberuloj oni bazas sur la pretekstoj, ke temas pri dangeruloj. Ili signifas minacon por la registaro. Tamen neniu serioza homo povas tion kredi. Vero estas, ke la jarojlonga malhoma traktado ne sukcesis rompi la reziston de la enkarcerigitoj. Nun la regantoj de Grekio serĉas novajn rimedojn por atingi tion.

La krioj, kiuj atingas nin el la "Tomboj por vivantoj" ne estas krioj de malespero, sed esprimo de fido, memkonfido al la estonto, al la justeco kaj humaneco, fido al nia solidareco kaj nia intereso savi ilin.

Espeɍantlingvajn protestojn kaj solidarecesprimojn sendu al: LEAGUE FOR DEMOCRACY IN GREECE?19 Beak St. 19, LONDON, W. I. Anglio Marku per la vorto "ESPERANTO".

Traduka servo de S. A. T.
C. Fielding

<u>Dro. Kamarýt:</u>

Via bulteno restas daura dokumento pri via kontribuo al nia movado. Akceptu mian dankon! Spitante oficialulojn ni vivas kaj vivos. La marŝo de la progreso ne estas haltigebla!

# KORESPONDI DEZIRAS

" necesas!



-2-

Unufoja ordinara korespondanonco kostas 10.Kčs aŭ 2 internaciajn respondkuponojn.Ĉiu anoncanto almenaŭ 1 foje respondu al ĉiu korespondpetanto.Uzu Esperanton por la propagando de la mondpaco !

K-do.E.ROSNER,Lugauerstrasse 87, Oelsnitz-Erz.,Sachsen,D.D.R.Germanio,kun pacdefendantoj kaj interŝanĝi materialon por levi la Esp-movadon en la Germana Demokr. Respubliko.

K-do.PAPP Imre,Fürst Sándor u.37 sz.,PÉCS,Hungario/13 jarulo/per let.p.k.il.pri paco,kun ĉiuj l.

K-dino.ITALIA Piccoli/18jara - helpdentistino/LAGOA VERMELHA, RGS. Brazilio,kun ĉiuj landoj.

K-do.Takomitu Tomoyori,3 syowadori Tebira,WAKAYAMASI,Japanio,interŝanĝas il.p.k. kaj p.m.

K-do.Tavosz LAJOS,Gábor Áron u.l. PÉCS-MESZES,Hungario/13jara/ per il.p.k.,kolektas p.m.

Städtisches Fremdenverkehrsamt, BINGEN /Rein/ Germanio,dissendas senpage belan prospekton pri tiu fama banloko.Petu per il.p.k.

K-do.SCHREMPF Jósef,Mesckemence atca 17,PÉCS-GYÁRVÁROS,Hungario, /13jara/deziras interŝanĝi il.p.

K-do.Stanislav WIDLAK/19j.stud./ Ul.B.Prusa 3.m.7.KRAKÓW,Polio, kun ĉiuj landoj per bildkartoj.

K-do.Ejner JENSEN,gl.Ribevej 2, VEJLE ,Danmark,Danlando/28jara fervojist/per let.kaj il.p.k.

S-ano.Petar MILANOVIĈ,/studento/ Kumodraška 76,BEOGRAD,Jugoslavio, koresp.kaj interŝanĝas p.m.

K-do.Roland LINDBLOM,Sveagatan 41 ALINGSÅS,Svedio,10 gekursanoj de 15-35j.koresp.kun ĉiuj landoj.

K-do.M.v.SAANE,Dorpsstr.161,JISP, Nederlando,kun ĉiuj landoj.

S-ino.Roberta DREYER,6000 Huntington,Ave,RICHMOND 8,Calif.Usono koresp.per bele afrankitaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

"AŬSTRIA PACRONDO ESPERANTISTA" estas nomo de la bulteno, kiun eldonas esperantistoj-pacdefendantoj en Vieno. Ĝi estas abonebla pere de k-do Rudolf Burda /Plzeň, Palackého nám. 6/. La abonpago kostas 6 Kčs.

TRAFA PORPACA LABORO. La eduka ministerio de la Respubliko Guatemala arangis tutmondan ekspozicion de infandesegnaĵoj kaj pentraĵoj, kiun partoprenis ankaŭ kelkaj infanoj el Ĉeĥoslovakio. Nun ili ricevis belan prospekton kun bildoj el la ekspozicio de la ministerio por edukado de la Respubliko Guatemala kaj serion da belkoloraj bildkartoj pri gvatemalaj indigenoj. En Plzeň unu el la plej junaj pacdefendantoj, 11-jara k-do Pavel Šťastný, kiu sendis por la ekspozicio serion da porpacaj desegnaĵoj ricevis krome ankoraŭ de la eduka ministerio de Guatemala specialan honorigan diplomon.

G R A V A  A T E N T I G O ! Kaŭze de diversaj malhelpoj aperas kun granda malfruiĝo la 17a kaj 18a numeroj de La Pacdefendanto, por kiuj estis materialo preparita jam en majo kaj junio. Ili estas samtempe dissendataj. Venonta numero de la bulteno aperos post la ferioj. Tial ni petas niajn ŝatatajn abonintojn, ke ili pacience atendu kaj ne alsendu al la redaktoro urĝigleterojn.

---

Redaktis: Rudolf B u r d a, Palackého nám. 6, Plzeň, Ĉeĥoslovakio.
Eldonis: Esperantský kroužek při Osvětové besedě v Olomouci.